



Ho Ĉantorio

Ho, Ĉantorio en Silezio
ni vin salutas el la kor',
ho Ĉantorio en Silezio
lulilo de la bonhumor'.

Ho, Ĉantorio en Silezio
super vi ĉiela azur',
ho Ĉantorio en Silezio
ni vin vizitas kun plezur'.

Ho, Ĉantorio en Silezio
sukcese kresku verda flor',
ho, Ĉantorio en Silezio
restos en nia rememor'.

Ĉantorio [J. Hanzelka]

Ĉu suŝ brulas, aŭ ĉu pluvas
ĉiujare marŝas ni,
[al plej bela, verde stela,]
[nia monto Ĉantori]

Holari, holari, vivu nia Ĉantori'!

En la vento flirtas flago,
gojsalutoj kun ekkri
[vivu karaj verdstelanoj]
[vin salutas Ĉantori]

Holari ...

Ne ekzistas lingvaj baroj,
laŭ longjara tradici,
[kunvenadas ĉeĥoj, poloj,]
[sur montsupro Ĉantori]

Holari ...

Kante sonas Esperanto,
en modela harmoni,
[ne dividas montoj, maroj,]
[nin kunigas Ĉantori]

Holari ...

Ĉarma nia junularo,
ĉarmaj montoj en juni,
[je revido venontjare,]
[sur la monto Ĉantori]

Holari ...

